

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia  
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

## ENHAVO :

Al vi, ho Dio, nun ni krias... (de G. K. Chesterton, trad. Bojec Molodoj). — LA JUNA BATALANTO EN LUKSEMBURGO (de La Juna Batalanto). — Irlando (de Wilhelm Solzbacher). — La nova helpepiskopo de Praha, D-ro Ant. Eltschkner - la unua episkopo Esperantista en la tuta mondo (de la Klubo de Katolikaj Esperantistoj en Praha). — 1100-jara jubileo de la unua kristana preĝejo en Nitra (de Alojz Macek). — La tragedio de la germanaj katolikoj (de B. M.). — Nazi-oj kaj la Nazareno (de Pastro John Robinson, S. J.). — LA GRALO, Pli ol 15.000 junaj batalantinoj jam grupiĝis sub la Graal-standardo (de Albert E. Hepton). — La katolika junularo en Madagaskaro (de Pastro De La Devèze). — La Esperanto-Movado. — Nia Movado. — Kie oni parolas pri ni...

REDAKCIO : 77, Montée de Pilate, Luxembourg-Eich.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO.

77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.

## Abonprezoj de "La Juna Batalanto,"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, aŭstrajn, belgajn, francajn, germanajn, luksemburgajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	4 simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	3 s	4 s	1 s 3 d	Hungarujo	3 p	4 p	2 p
Argentino	1.50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	3 s	4 s	1 s 3 d	Japanujo	3 s	4 s	1 s 3 d
Aŭstralio	3 s	4 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3.40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3.50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0.50 dol	0.75 d	0.30 d
Cehoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1.25 fl	2 fl	0.80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1.20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1.20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50	15 dr	Svisujo	2.50 fr	4 fr	1.50 fr
Hispanujo	5 p	8 p	2 p	Usono	0.50 dol	0.80 dol	0.30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj* : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj*. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12 017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

*Cehoslovahujo* : 15.132 (Ustredie slovenských katolíckých skautov pre Slovensko, Bratislava).

### AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŝUROJN!

**Mondjunularo Katolika**, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto). 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

**Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique**, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

**La Jeunesse Mondiale Catholique**, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0.70 RM).

**Dans 60 pays**, dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).

**Towards an International Catholic Youth and Peace Movement**, kvarpaĝa varbilo en angla lingvo. 10 ekz. 5 d, 8 c (0.25 RM), 50 ekz. s 1/6, dol. 0.25 (1.— RM).

**Die katholische Jugend lernt Esperanto**. Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga**. Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga**. 16 paĝa broŝuro aperinta 1919. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.10 RM.

**Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung**. Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlâth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.20 RM.

Eldonejo **LA JUNA BATALANTO**, 77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.

## Al vi, ho Dio, nun ni krias...

Al vi, ho Dio, nun ni krias  
Kaj nian plendon portas  
Teraj regantoj malfunkcias,  
Kaj la popoloj mortas.  
Muroj de or' nin entombigas,  
Kaj sangaj glavoj nin disigas.  
Ho, savu vian teron!  
Detruu la fieron!

De tuta la terurinstruo,  
Mensogoj buŝaj, plumaj,  
De vanta memadora bruo,  
De kruelaĵoj fumaj,  
Vi liberigu nin, Sinjoro,  
De la vendado de l'honoro,  
De l' glav' en ĉiu formo,  
Kaj de la pia dormo!

En unu nur ligilo ligu  
Pastrojn, princojn, popolojn,  
Kaj ĉies vivojn do kunigu,  
Savu la bonajn volojn,  
Ke kresku kredo, am', espero,  
Estu loĝantoj de la tero  
Unu naci' en savo  
Kaj por vi unu glavo!

Gilbert Keith CHESTERTON,  
el angla lingvo trad. Bojec Molodoj.

## La Juna Batalanto en Luksemburgo.

La Juna Batalanto salutas siajn gelegantojn tutmondajn el nova hejmlando. Kune kun la internacia sekretario de MOKA redakcio kaj eldonejo tranloĝiĝis al Luksemburgo. Ni esperas, ke tiu ĉi landeto kun apenaŭ 300.000 enloĝantoj, kuŝanta meze inter Germanujo, Francujo kaj Belgujo kaj influata de du kulturoj kaj du lingvoj, estos taŭga kaj favora loko por nia internacia centro. Ĉi tie ni estas tute liberaj kaj sendependaj de iuj politikaj influoj, kiuj povus malfavore rilati al nia agado.

En Luksemburgo MOKA havis sian duan internacian kongreson en la jaro 1922, kaj en diversaj internaciaj kunvenoj poste okazintaj en la lando MOKA-anoj fervore partoprenis. Nia movado ja ĝis nun neniam estis forta en Luksemburgo, kaj la du abonantoj, kiujn LA JUNA BATALANTO posedis en la ŝtato, ne multe plifortigis ĝin. Ni esperas, ke post iom da tempo ni tamen povos ekzerci ankaŭ iom da loka influo kaj instigi viglan MOKA-movadon en ĉi tiu lando de la pontoj.

Ni do komencas novan epokon. La internacia sekretario de MOKA, kiu estis de 1920 ĝis 1923 en Graz (Aŭstrujo), de 1923 ĝis 1926 en München (Germanujo), de 1926 ĝis 1928 en Honnef (Germanujo), de 1928 ĝis 1933 en Köln (Germanujo), de post la 1 junio 1933 troviĝas en Luxembourg (Luksemburgo), same la redakcio de J. B., kies ĝisnunaj hejmoj estis Honnef kaj Köln. La administracio, se oni enkalkulas la antaŭulon de LA JUNA BATALANTO, la Junulan Angulon en KATOLIKA MONDO, jam faris pli longajn vojaĝojn, estinte en Graz (Aŭstrujo), Zug (Svisujo), London (Anglujo), Elberteld (Germanujo), Köln (Germanujo) kaj post la sendependiĝo de La Juna Batalanto en Werl (Germanujo) kaj Köln (Germanujo).

En nia nova epoko ni atendas de nia geamikaro tutmonda fidelecon kaj konstantan kunlaboron. Neniam nia movado kaj nia gazeto estis pli necesaj ol nun. Subtenu nin! Varbu, agadu, batalu! La beno de la Princo de la Paco estu kun ni!

LA JUNA BATALANTO.

# IRLANDO.

La oceanŝipo ekhaltis, kaj ni malsupreniras en malgrandan boaton, kiu portos nin al la tero. Jen salutas la Verda Insulo. Tiel verda, tiel freŝa, tiel ĉarma, kiel povas esti nur Irlando, kiam oni vidas ĝin, revenante de Ameriko. Kiel grandaj balenoj insuloj kuŝas en la golfo, sur fieraj terasoj la domoj de Cobh etendiĝas, solene la katedralo de Sankta Coleman salutas la revenantojn.

Ni veturas en la vesperon, preskaŭ ĉiam laŭlonge de la maro kaj de la rivero Lee. Montoj, arboj kaj romantikaj konstruaĵoj speguliĝas en la akvo, la lastaj radioj de la suno ludas sur la ondoj, kaj ni kantas unu irlandan kanton post la alia. Mi ja estas la sola eksterlandano inter grupo da irlandanoj kaj irlandaj amerikanoj. Kelkajn tagojn antaŭe ni festis sur la ŝipo la Tagon de Sankta Patrick, apostolo de Irlando, kaj kelkaj el miaj gekunuloj ankoraŭ portas insignojn kun enskribo « Erin ga braugh », « Irlando por ĉiam ». Post Cork ni venas tra enlandaj pejzaĝoj, kaj en Limerick Junction ni perdas kelkajn el niaj kunvojaĝantoj, kiuj iras al Tipperary, famkonata regiono. Iliaj parencoj estas je la stacidomo, kaj la ĝojo de la revido estas nepriskribebla. Ĉi tie montriĝas la vigla temperamento de la keltaj popoloj. Mi troviĝas meze inter la Tipperaryanoj kaj ankaŭ mi ricevas kisojn de ĉiuj flankoj. Nur du ni estas, por daŭrigi la vojaĝon norden, kaj el la fenestro Patrick kaj mi ankoraŭ longe vidas la svingiĝantajn tukojn...

Jes, la lando estas bela, kaj la popolo estas kvazaŭ kreskinta el la tero. Mi vidis la marbordon de Cobh kaj tiun ĉirkaŭ Dublin kun la ĉarma golfo de Killinoy kaj la Okulo de Irlando. Aŭtomobile amikoj montris al mi la montojn de Wicklow kaj la tipajn pejzaĝojn kun ŝtonmuroj laŭlonge de la vojo. Kaj la ĉefurbo Baile Atha Cliath aŭ Dublin! Mi konas preskaŭ ĉiujn eŭropajn ĉefurbojn, sed nur malmultaj povus rivali kun la irlandaj! Sendube Irlando meritas, esti pli konata en la mondo kaj esti pli vizitata de turistoj kaj vojaĝemuloj.

Frue en la mateno mi alvenas en la ĉefurbo. Laŭlonge de la vojo mi trovas preĝejojn. Mi eniras, ĉiu el ili estas plene. Kaj oni diras al mi, ke tio estas fakto ne nur en certaj tempoj, sed ĉiam! La irlandanoj estas katolika popolo. Dum jarcentoj de persekutado kaj mallibereco ili defendis kaj konservis sian kredon, tiel ke por ili irlandaj katolika fariĝis preskaŭ identaj. Nepraktikantaj katolikoj preskaŭ ne ekzistas, kaj ankaŭ tiuj, kiuj elmigris en aliajn landojn, pli bone gardis sian kredon ol aliaj nacioj. Kie en la mondo oni renkontas irlandanon, tie oni renkontas katolikon — la frazo suferas nur malmultajn esceptojn.

Ekzistas malmultaj popoloj, kies tuta nacia tradicio estas katolika. Se oni serĉas ekzemplojn, oni certe trovos unuavice la irlandanojn kaj eble la polojn. Fakte ambaŭ nacioj montras en sia katolikismo interesajn similaĵojn, en ambaŭ la nacia kaj la katolika spirito tute penetriĝis.

En la katolika mondo oni komencis iom pli paroli pri Irlando okaze de la Eŭkaristia Kongreso en la lasta jaro. Oni admiris la eksterordinare imponan karakteron de la kongreso kaj laŭdis la organizon. Mi parolis kun personoj, kiuj kunlaboris en la organizado. Ili konvinke klarigis al mi, ke la organizo tute ne estis la ĉefa afero en la sukceso. Sen bona organizo la samaj grandegaj homamasoj estus alkurintaj, en sama maniero ĉiu irlandano estus peninta iel partopreni, la sama entuziasmo estus skuinta la urbon Dublin kaj la tutan landon. La organizo ja estis bonega kaj garantiis ordon kaj akuratan disvolviĝadon de la programo; la entuziasmon neniu propagando bezonis krei, ĝi simple venis el la irlandaj katolika animo.

**KURAGON KAJ FERVORON** ni deziras al ĉiuj geamikoj. Ili agadu, propagandu kaj varbu!

Estas io grandioza, se la animo de tuta nacio estas tiel katolika kaj se la memoro je la prapatroj, kiuj fariĝis martiroj pro sia kredo, tenas la filojn. Estas io fieriga, aparteni al lando, el kiu iam foriris apostoloj, kiuj kristanigis vastajn regionojn en Eŭropo. Estas io ĉarma en la legendo, ke Sankta Patrick forpelis ĉiujn serpentojn el Irlando, legendo, kiu simbolas la transformadon kaj plimildigon de lando kaj popolo per la influo de la kristanismo.

Komprenoble tia situacio ankaŭ enhavas certajn danĝerojn. Se la tuta tradicio estas katolika, oni facile emas, vidi en la religio ĉefe aŭ sole tradician aferon. Oni estas katolika, ĉar la patro kaj avo ankaŭ estis tiaj, kaj oni povas forgesi la eternan vokon de la kristanismo al ŝanĝo kaj renoviĝo en ĉiu tempo kaj en ĉiu unuopulo. La aktivajn devojn de la katolikeco oni pli facile sentas, se oni vivas en nekatolika kaj kontraŭkatolika ĉirkaŭaĵo.

Mi parolis pri danĝero, sed ne diris, ke la irlandanoj pereis en ĝi. Tute ne. Eble iam multaj pensis, ke katolikaj organizaĵoj estas nenecesaj en katolika lando. Nun la gvidantaj katolikoj ne havas tiun opinion. Por vere realigi la reĝecon de Kristo, por formi la tutan vivon privatan kaj publikan, la ekonomion, socion, kulturon kaj ŝtaton laŭ kristanaj principoj, la fakto, ke preskaŭ la tuta loĝantaro estas katolika, ja signifas valoran cirkonstancan, sed tute ne senpenan, memkompreneblan efektiviĝon. Katolika Agado estas necesa, ankaŭ en landoj kiel Irlando, kaj ĝi ekzistas.

Rilate al la katolika junularo, la plej vigla movado certe estas la **katolikaj skoltoj**. Ĝi ankoraŭ estas juna, ĝia bonega revuo « An Gasog Catoiliceach » nur fondiĝis en 1932, sed ĝi jam vigle enradikiĝis en la junularo kaj havas kapablajn larĝvidajn ĉefojn. Ankaŭ katolikaj skoltinoj ekzistas. Rimarkinde estas, ke, en kontrasto kun katolikaj skolligoj en aliaj landoj, la irlandanoj ne estas aligintaj al la Londona Skolta Oficejo.

Pri la **Katolika Junvira Societo**, la **Katolika Studenta Federacio** (Cumann na Mac-léighinn gcatoiliceach na h-Eireann) mi citu nur la nomojn.

Gravegan taskon havas la Societo por la Disvastigo de la Katolika Vereco (**Catholic Truth Society**), kiu disvastigas popularajn broŝurojn pri katolikaj principoj kaj ilia apliko al modernaj problemoj. La katolika gazetaro estas bone evoluigita. Mi vizitis « **The Irish Independent** » kaj « **The Irish Press** », la du plej gravajn ĵurnalojn en Dublin, kaj miris pri ilia bona ekipo. Eksterlande multaj ja pensas, ke en Irlando oni legas anglajn ĵurnalojn. — Gravaj semajnaj gazetoj kun alta eldonnombro estas « **The Spectator** » kaj « **The Irish Catholic** », la laste nomita publikigas diversajn speciale gravajn rubrikojn pri diversaj movadoj, i. a. bonege redaktitan Esperanto-kolonon redaktitan de nja amiko Lorcan OhUiginn sub la aŭspicioj de la Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj (**ILKE**). Grava monata revuo estas « **The Catholic Mind** », mi petas la pardonon de ĉiuj organizaĵoj kaj gazetoj, kiujn mi ne citis...

Irlando estas la hejmlando de interesea apostola movado, kiu preparas gvidantojn fidindajn kaj humilajn, kiuj fordonas sian tutan personon al la servo de Kristo kaj de la proksimulo, la **Mariana Legiono** (Legion of Mary), kaj kiu jam enradikiĝis en multaj landoj, eĉ inter simplaj indianoj en Kanado kaj minlaboristoj en Usono. Pri ĝi mi iam parolos pli detale.

Interesa, grava kaj bone organizita grupo estas la **Kavaliroj de Sankta Kolumbano** (Knights of St. Columbanus). Ĝi kunigas eliton de katolikaj intelektuloj kaj komercistoj por realigo de katolikaj principoj en sia profesia kaj publika vivo. Sekvinte en multaj rilatoj la ekzemplon de la amerikanaj Kavaliroj de Kolumbo (Knights of Columbus), ili tamen ne volas esti kopio de tiu asocio, sed formi sian agadon laŭ la irlandaj bezonoj kaj resti malfermataj al bonaj sugestoj el katolikaj movadoj ĉiulandaj, kun kiuj oni deziras starigi amikajn kontaktojn. Mi havis la plezuron, multe esti inter la Kavaliroj kaj kelkaj el iliaj plej gravaj membroj, kaj ne dubas, ke ili povos fari gravan servon al la Katolika Agado.

La katolika Esperanto-movado ne estas forta laŭ nombroj, sed ĝi havas fervorajn kaj kapablajn pionirojn, kaj oni komencas en katolikaj rondoj, koni kaj respekti ĝin. En skoltaj rondoj Lorcán OhUiginn varbadas kaj kursgvidadas, la aferojn de ILKE akurate prizorgas S-ro Macauley, kaj kelkaj pastroj ankaŭ kunlaboras en la movado. En lando kun tiel vivoplenaj katolikaj fortoj kaj tamen kun relative malfortaj rilatoj al alilandaj katolikaj movadoj la Esperantistoj povus plenumi gravan rolon. Mi eĉ havas la ambician revon, ke iam en Irlando ekzistos vigla MOKA-movado kaj ke LA JUNA BATALANTO gajnos ioman disvastiĝon... La multaj ĵurnalraportoj kaj intervjuoj okaze de mia vizito almenaŭ efikas, ke multaj homoj konas la nomon de nia movado kaj nia gazeto...

La lingva situacio en Irlando estas ekstreme interesa. En la jarcentoj de mallibereco la irlandaj lingvoj eĉiam pli retiriĝis kaj estis anstataŭata de la lingvo de la regantaj angloj, ĝis kiam ĝi fine nur plu estis la gepatra lingvo de malmultegaj irlandanoj. Sed nun potenca reviviĝo estas eĉie sentebla. Mi aŭdis multajn personojn flue interparoladi en irlandaj lingvoj; kaj eĉie oni vidas la rondajn arĝentajn kaj orajn insignojn, kiuj montras scion de la lingvo. En ĉiuj lernejoj oni fervore lernas, kaj mi ne dubas, ke post kelkaj generacioj la irlandaj lingvoj denove estos la gepatra lingvo de la popolo. Ĉiutaga ĵurnalo en irlandaj lingvoj ankoraŭ ne ekzistas. Sed la ĵurnaloj ĉiutage enhavas kelkajn kolonojn en ĝi. La lingvo estas bela kaj interesa, mi mem antaŭ kelkaj jaroj, sekvante insistan peton de irlandaj amikoj, komencis studi ĝin, sed mi ne konas multe pli ol la alfabeton kaj kelkajn frazojn...

Pri la irlandaj politikoj mi ne volas multe diri. Mi atente aŭskultis, kion la plej diversaj personoj rakontis al mi, mi parolis kun kelkaj gvidantaj personoj de ĉiuj partioj (Fianna Fail, Cumann na nGaedheal, Laborista Partio, cetere en ĉiuj partioj laboras bonaj katolikoj), kaj mi havis la honoron, paroli kelkajn vortojn kun S-ro De Valera mem, la prezidanto de la registaro, kies personeco faris fortan impreson al mi. Mi estas ne sufiĉe kompetenta, por publike eldiri, kion mi trovas simpatia kaj kion kritikinda en la irlandaj politikoj. Nur pri la naciismo mi volas diri kelkajn vortojn. Mi povus diri pri la irlandaj naciismo preskaŭ la saman, kion mi antaŭ kelkaj jaroj skribis pri la pola naciismo. Liberiĝo post longa sklaveco kaj batalado eĉiam kreas entuziasman patriotan senton. Se la popola animo estas katolika, la katolika universaleco povas reteni ĝin de la degenero de rajtigita amo al la patrolando en ekscesan naciismon. Jen speciala tasko por internacia katolika kunlaboro. La potencaj katolikaj energioj de la irlandaj popolo povas esti helpo, modelo kaj instigo por la tuta katolika mondo (la Eŭkaristia Kongreso jam donis ideon pri tio), kaj aliflanke kunlaboro de la irlandanoj en la internacia katolika agado gardos la irlandanojn de izoleco, kiu ne estas sen danĝeroj. Mi havas la impreson, ke la irlandanoj mem estas pretaj al tia internacia kunlaboro, en kiu ĉiuj popoloj donas kaj prenas kaj helpas unu la alian.

Adiaŭ, Irlando! Insulo en la maro, verda kaj gaja, fieraj kaj gastemaj! Popolo de apostoloj kaj martiroj, de malnova kulturo kaj profunda religia sento! Adiaŭ, geamikoj, adiaŭ, katolika junularo irlandaj! Kaj ĝis revido!

Wilhelm SOLZBACHER.

#### NOVA ADRESO DE LA JUNA BATALANTO :

77, Montée de Pilate, 77, LUXEMBOURG - Eich, Luksemburgo.

Ĉion por redakcio kaj eldonejo nur sendu al ĉi tiu adreso! Mensejoj surhavi la personan nomon de la redaktoro, D-ro Wilhelm Solzbacher! La internacia oficejo de MOKA (Mondjunularo Katolika) havas la saman adreson. Sendajoj adresitaj al Köln ĝenerale ankoraŭ alvenas, sed nur kun malfruigo.

## La nova Helpepiskopo de Praha

D-RO ANT. ELTSCHKNER - LA UNUA EPISKOPO ESPERANTISTA  
EN LA TUTA MONDO.

D-ro Ant. Eltschkner eklernis Esperanton en la jaro 1924 en kurso de Ĉeĥoslovaka Esperanto - Instituto en Praha. 1925 li aliĝis al la Esperanta sekcio de la Katolika Konsilantaro. 1926 li estis elektata prezidanto de la Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj en Praha. Fariĝinte 1927 metropola kanoniko eĉie la katedralo de Sankta Vito en Praha li komencis propagandi Esperanton en altaj ekleziaj rondoj ĉeĥoslovakaj.

1929 li kunfondas la Ligon de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo kaj fariĝas ĝia prezidanto. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) nomas lin membro de sia Internacia Komitato. En la sama jaro li plene sin dediĉis al Esperanto-propagando per la miljarfesto de Sankta Venceslao. Persone li direktis la preparajn laborojn por la XIV-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Praha 1929.

D-ro Ant. Eltschkner reprezentis la propagandan Esperantan fakon en la Komitato por la miljarfesto de Sankta Venceslao, kiu eldonis esperantlingvan broŝuron pri Sankta Venceslao kaj belegan afiŝon kun esperantlingva teksto. La unuan publikan paroladon en flua Esperanto li faris eĉie la malfermo de la XIV-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Praha, aŭgusto 1929. kore bonvenigante la kongresanojn. Dufoje, la 16 marto kaj la 12 oktobro, li faris elokventajn predikojn en Esperanto en la preĝejo de Sankta Ursula en Praha. 1931 li subtenis la propagandvojaĝon de la Prezidanto de IKUE, Pastro Font Giralt el Gerona (Hispanujo) tra Ĉeĥoslovakujo.

1932 li fondis du monpremiojn por la Interkatolikaj Esperantistaj Floraj Ludoj. En februaro 1933 li ricevis el Romo dekreton de episkopo en Zefirio kaj helpepiskopo en Praha. Lia Episkopa Moŝto D-ro Ant. Eltschkner estas prezidanto de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo kaj de la Klubo de Katolikaj Esperantistoj en Praha. En lia persono la Esperantistaro havas la unuan Esperantistan episkopon en la tuta mondo, kiu perfekte parolas nian lingvon kaj kuraĝe laboras por ĝia praktika disvastigo.

Ci-tiu artikolo sendita al ni de la Klubo de Katolikaj Esperantistoj en Praha ĝojigos niajn gelegantojn tutmondajn. Oni permesu al la redakcio de LA JUNA BATALANTO, aldoni siajn proprajn respektplenajn kaj tutkorajn gratulojn al Lia Episkopa Moŝto D-ro Eltschkner, kiu ja ankaŭ estas fidele abonanto de LA JUNA BATALANTO. Kaj gratulojn ankaŭ meritas la suprenomita katolikaj Esperanto-organizaĵoj, kiujn li kun tiom da kompetenteco kaj fervoro prezidas.

Mgr. Eltschkner ja ne estas la unua episkopo Esperantista en tiu senco, ke li lernis Esperanton kaj simpatias ĝin. Jam en la Oka Universala Kongreso de Esperanto en Krakow (1912) Episkopo Bandurski predikis en Esperanto. Kaj ni scias pri episkopoj diverslandaj, ke ili lernis Esperanton, favoris ĝin, prezidis Esperanto-asociojn. Ankaŭ LA JUNA BATALANTO havas kelkajn episkopojn inter siaj abonantoj. Sed Mgr. Eltschkner certe estas la unua episkopo, kiu aktive partoprenis la Esperanto-movadon kaj daŭre okupiĝas pri ĝi. Belan pruvon de tio li donis, akceptante en sian episkopan sigelon, kiu portas la belan enskribon « Caritas Christi urget nos » (La amo de Kristo pelas nin), la Esperanto-stelon.

DORMU bone, se vi jam pagis vian abonon! Se ne, sendu al ni tuj vian abonprezon! Ne bojkotu la sindonan laboradon de gesamideanoj per via forgesemo!

## 1100-JARA JUBILEO DE LA UNUA KRISTANA PREĜEJETO EN NITRA.

De Alojz Macek, Bratislava.

(Fino.)

La princo Privina estis ankoraŭ nur kateĥumeno, kiam li konstruis la sanktejon en Nitra. Frue post tio li estis forpelata kaj ekloĝis en Postdanubujo, kie li estis ankaŭ baptata kaj de kie li vastigis kristanan kulturon. Li sola konstruigis 15 kristanajn preĝejojn en la kasteloj, kiuj tiel fariĝis luliloj de la kristana kulturo.

La regiono de Nitra estis regata de moravia princo Mojmir, kiu tiel unuigis la slavajn gentojn troviĝantajn norde de la Danubo. Sed en la jaro 846 reĝo Ludoviko forigis lin kaj anstataŭis lin per lia nevo Rastislav. La nova reganto Rastislav faris la Nitregionon princregionon, kiun administris lia nevo Svatopluk.

Svatopluk kun sia onklo Rastislav venigis al sia imperio nomata Granda Moravujo la apostolojn Sanktajn Konstantenon kaj Metodon. Nur ĉi-tiuj fervoruloj metis firman bazon al la kristana kulturo en la danuba regiono. Ili influis ne nur la slavajn gentojn en Mezeŭropo, sed ankaŭ la nordajn. Konstanteno kaj Metodo donis la fundamenton al la slava liturgio, al la slava literaturo, ili donis al la slavaj gentoj ne nur alfabeton « glagolica » nomatan, sed ili tradukis unuatoje en slavan lingvon la Sanktan Skribon. La nomitaj apostoloj donis ankaŭ al la sudeŭropaj, bulgaraj gentoj gvidantojn en siaj lernantoj, kaj kiel slavliturgianoj estis forpelitaj per la okcidenteŭropaj latiniganoj kaj restis en Suda Eŭropo.

Cirkaŭ 870 la princo Rastislav akiris la supron de sia potenco. Sed lia nevo Svatopluk nun fariĝis al li malfidela kaj ruze liveris sian onklon al malamiko, kiu lin kruelege blindigis kaj jetis en malliberejon. La sceptron de Granda Moravujo prenis Svatopluk, kiu Rastislavon ankoraŭ superis per potenco kaj milita gloro. Sed la kristanismo li ne tre ŝatis. Ĉefepiskopon Metodon li liveris al malamikoj, kiuj lin turmentis kaj trenis tra la malliberejoj. Sed la peko de Svatopluk fariĝis lia puno, ĉar ankaŭ lin ruze perfidis liaj amikoj, kaj la malamiko jetis lin en malliberejon.

La administrantoj de Granda Moravujo dume estis Viliam kaj Engelsalka. Slavaj gentoj frue ekribelis sub gvidado de heroo Slavomir. Franka armeestro Karolman petis Svatoplukon el malliberejo kiel gvidanton de sia armeo, esperante, ke Svatopluk volos venĝi siajn perfidulojn kaj venkbatos ilin. Sed Karolman trompiĝis. Antaŭ renkontiĝo de la armeoj Svatopluk intertraktis kun la slava gento, prenis la gvidadon kaj forpuŝis la armeojn de Karolman. Kiel nova reganto de Granda Moravujo li vere florigis sian imperion. Kristana kulturo rapidege disvastiĝis el la plej grava centro Nitra. La historiistoj ja supozas, ke Nitra estis ne nur la loko, kie staris la unua kristana preĝejo, sed ke ĝi estis ankaŭ sidejo de ĉefepiskopo Metodo kaj de la reganto de Granda Moravujo Svatopluk. Oni konjektas tion ankaŭ laŭ la multnombraj elfosaloj el la lasta tempo. Fakte tamen estas: se ankaŭ Nitra ne estus estinta sidejo de la sanktaj apostoloj certe iliaj paŝoj iris antaŭ ĉio al loko, kie staris la kristana sanktejo kaj kiu tiam loĝis ankaŭ princo Svatopluk. Sendube oni povas diri, ke Nitra kiel episkopa sidejo fariĝis centro de kristana kulturo, el kiu disvastiĝis la instruo de Kristo, kaj kiam Metodo fariĝis ĉefepiskopo, eĉ ĉefepiskopa sidejo. Idolana gentoj, kiuj vivis apud la Danubo kaj kiuj ankoraŭ venadis en la naŭa, deka dekonua jarcento aŭ eĉ pli malfrue, ĉiuj suĉis el la fonto de la kristana kulturo ĉiujn nutris, ĉiujn rekreis la kristanismo, kies centro estis la « granda panjo Nitra. »

Sed la gloro de Nitra falis, la potenco Granda Moravujo disfalis post la morto de Svatopluk. Pro kio? Pro malkonkordo. Kiam Svatopluk vidis proksimiĝi la morton, li vokis al si siajn tri filojn, kiel diras la tradicio. Li donis ili unu post la alia ligajon da bastonoj kaj diris: « Rompu! » Neniu povis rompi la ligajon. Poste Svatopluk disligis la ligajon kaj donis al ĉiu el siaj tri

filoj po unu bastonon, petante, ke ili provu rompi. Ĉiu facile rompis la bastonon. Post tio diris Svatopluk: « Karegaj filoj! Se vi kuntenos, kunlaboros konkorde kiel ĉi tiuj bastonoj en ligaĵo, neniuj vin venkos, sed se vi ne laboros konkorde, la malamiko vin detruos, neniiĝos vian imperion, vian popolon. Post tiuj vortoj li ellasis la animon. La filoj forgesis la instruplenajn vortojn de sia patro, la malkonkordo alportis al ili, al ilies imperio pereon, ĉar la malamiko ilin dispelis kaj uzurpis la sceptron.

Jes, slovakoj, loĝantaj ĉe Danubo en Centra Eŭropo, nunjare festas la 1100-jaran datrevenon, por rememorigi multsignifan tempon, kiu alportis al niaj antaŭuloj fonton de vivo, fonton de vera kulturo, fonton de rekreo. La ĉefaj tagoj de la festoj estos la 12-16 aŭgusto 1933, tiam en antikvogloro Nitra kunvenos ĉiuj amikoj, kiuj ĉerpis el ties fonto.

## La tragedio de la Germana Katolikoj.

Mgr. Wolker, pastra ĉefgvidanto de la Katolika Junvira Asocio, kiu havis 400.000 membrojn kaj estis la plej grava katolika junulara asocio de Germanujo, paroladis en Holando, flate abundanta la novan politikan sistemon en Germanujo kaj dirante, ke kanceliero Hitler persone promesis al li, ne ĝeni la katolikajn junularajn asociojn. Kelkajn tagojn poste lia asocio estis perforte detruita, lia oficejo fermita, ĉiuj posedaĵoj de la asocio konfiskitaj sub la nevera motivigo, ke la Katolika Junvira Asocio estis helporganizajo de politika partio.

La Katolika Junmetiista Unuiĝo (Gesellenverein) organizis grandan kongreson en Munĉeno, en kiu ĉiu parolado enhavis deklarojn de lojaleco al la nova reĝimo. Kaj en la sama kongreso la Kolpinganoj estis brutale atakataj de hitleranoj, kaj pro la sangaj konfliktoj, pro kiuj i. a. la eparkia pastra gvidanto de Mainz mortis per apopleksio, la kongreso devis esti antaŭtempe finata, eĉ antaŭ la solena meso, en kiu Kardinalo Faulhaber estus parolinta. Kelkajn semajnojn poste oni « enordigis » la asocion en la naci-socialistan laboristan organizaĵon, en unu germana lando (Württemberg) oni eĉ tute dissolvis ĝin.

La Paca Ligo de Germanaj Katolikoj ankoraŭ antaŭ kelkaj semajnoj klare skribis, ke ĝia sola celo estas la disvastigo de la katolika instruo pri la paco laŭ la pacaj direktivoj. La Ligo estis dissolvata.

Multaj gravaj katolikaj asocioj, inter ili junularaj asocioj, estas dissolvitaj, iliaj domoj kaj ilia posedaĵo estas konfiskitaj.

Multaj katolikaj pastroj iris en la malliberejojn de la « nacia registaro », kiu tiel pompe anoncis, ke ĝi respektas la kristanan bazon de la popolo. Pastroj estas sange batitaj. Ĝis nun nur unu episkopo uzis la plej severan punon, kiun la Eklezio konas, la interdikton (malpermeson de diservoj kaj religiaj funkcioj en certa teritorio), eble aliaj sekvos.

La episkopoj en cirkulero atentigis, ke la katolikaj jurnalaj estas grava ilo de la animprizorgado kaj ke ili staras sub la speciala protekto de la eklezia aŭtoritato — kaj ne ekzistas katolika ĵurnalo, kiu ne estis almenaŭ por kelkaj tagoj aŭ semajnoj malpermesita. Neniu povas libere skribi aŭ paroli.

La Centro kaj la Bavara Popola Partio, kiuj estis la politikaj partioj, en kiuj multegaj katolikoj vidis sian esperon, mortis senhonoran morton.

Per konkordate oni penas savi, kio ankoraŭ estas savebla...

La situacio havas almenaŭ unu utilon: ĝi detruas niajn belajn iluziojn. Ĝi montras al ni la internan mallorlecon de multaj aferoj, kiuj ŝajnis esti imponaj kaj potencaj.

Ni ne forgesu niajn amikojn, kiuj troviĝas en malliberejoj, kaj tiujn, kiuj perdis siajn postenojn kiel oficistoj aŭ profesoroj!

Kaj ni preĝu — por la persekutatoj, ke ili ne perdu la kuragon kaj restu fortaj en sia animo, kaj por la persekutantoj, ke Dio konduku ilin al la vojo de la justeco kaj amon...

B. M.

P. S. — Al la artikolo de nia kunlaboranto la redakcio devas aldoni, ke laŭ lasthoraj informoj parto de la mezuroj kontraŭ la Katolika Junvira Asocio estas retirita. La sekretarioj en Düsseldorf denove funkcias. Sed samtempe ni aŭdas pri novaj arestoj de pastroj kaj dissolvaj de katolikaj organizaĵoj. Nia amiko Pastro Franciscus Maria Stratmann O. P., aŭtoro de « Tutmonda Eklezio kaj Tutmonda Paco » (tradukita en kvar lingvojn) kaj vicprezidanto de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj, estis arestata la 6 julio 1933.

## Nazi - oj kaj la Nazareno.

De Pastro John Robinson, S. J., misiisto en Spokane, Usono.

Kiam la Jurnaloj hodiaŭ parolas pri la germana rasbatalo kontraŭ la judoj, katolikoj de Berlin ĝis San Francisco eble rememoras ion, kion ili ofte forgesas: Jesuo Kristo estis judo. Ĉu nia pensado estas maldolĉa pro indigno aŭ dolĉigita per kompato al la suferantaj homoj en Germanujo, ĝi devus gvidi nin de la rompitaj fenestroj kaj pentromakulitaj magazenoj, de la krianta popolaĉo kaj bruantaj brunevestitaj ataktrupoj al la urbetoj kaj polvaj vojoj de Palestino, serĉante Jesuon Kriston, por ricevi respondon pri ĉio ĉi. Ĉar li elektis, esti naskata en malgranda gento de malestimata semida popolo, kiu suferis pli multe da turmentoj ol iu alia nacio sub la ĉielo. Hitler estas nur unu el longa serio da persekutantoj, kiuj sidis sur la tronoj de postmusulmana Hispanujo, de Imperiestra Romo, de Gizeh en Malnova Egiptujo; la Babilona Kaptiteco, en iu senco, neniam ĉesis.

Ĉu la plej granda pioniro de rasegaleco, kiun la historio konas, elektis saĝe, kiam li volis preni judan junulinon kiel sian patrion? En unu kazo, almenaŭ, ni sentas lian ĉioscion. Estas konsolante, scii, ke la peranto inter blankaj, nigraj kaj ĉiaj aliaj homoj ne estas nur senfina Dio, sed ankaŭ homiĝinta Dio, kiu sangis kaj mortis en la manoj de la rasmalamo. Estas tute neverŝajne, ke la homo Jesuo ignoris sian naciecon, kiel modernaj kristanoj ignoras ĝin. Malmultaj konvertitoj trovis lian devenon ŝtono de la ekfalo, sed nur malmultaj katolikoj trovas ĝin remparo de la defendo. Se ni kontentiĝas pri la Kristo de la angla-amerikana, latina aŭ germana arto kaj ne vidas la Kriston de juda karno kaj sango, ni rabas de ni mem la realan Reĝon de la Reĝoj, por havi revon laŭ nia propra fantazio. Ĉar la homo en Jesuo Kristo estas la respondo al ĉiu rasproblemo.

Pilato kronis, kiel nur fieraĉa roma politikisto povis, la vivolongajn rashumiligojn de la milda Majstro. Estis karakterize pri Pilato, ke li, malestimante la malpli valoran rason eksterleĝan, demandis en indignitaj vortoj: « Ĉu mi estas judo? »

Ne, Pilato — vi ne estas judo; vi estas de bona, ruĝa, roma sango. Imagu al vi, ke la popolaĉo povus supozeti, ke la roma gubernoro povus esti semida laŭ kutimoj aŭ simpatioj! Sed Jesuo Kristo estas judo. Venu, Pilato, ankoraŭ spirite maĉanta je la insulta propono de la ĉefpastroj, venĝu vin, kaj najlu la trilingvan tabulon super lian krucon, ke ĉiuj homoj vidu, kion vi pensas pri la raso, kiu ne estas via!

Sed tio estis nur la lasta el multaj aliaj same kruelaj senhonorigoj, kiujn Nia Sinjoro renkontis pro sia nacieco. Riĉaj romanoj, grekoj, egiptoj ne estis forsendataj de hotelpordoj en malvarmaj vintronoktoj; se perso aŭ kretano havis specialan akcenton, neniu mokis pri tio; nur pri la galileanoj oni ridetis en la kosmopolita Jerusalemo. Komercistoj libere venis el Hindujo kaj Afriko al Romo; la apostoloj de Kristo estis martirigitaj tie. Certe, de homa vidpunkto Jesuo apenaŭ estus povinta elekti pli malestimatan kaj neliberan nacion ol tiun, en kiu li naskiĝis... sed Jesuo malofte konsideris la pure homan vidpunkton. Liaj okuloj estis sur ĉiu vigla urbo de la jarcentoj, sur la kampoj maturiĝantaj por la rikolto; lia granda, brulanta koro estis tro flama, por limigi sin al unu raso aŭ lingvo.

Do nia granda intereso konsistas ne tiom en la fakto de la multaj rasembarrasoj de Nia Sinjoro; ni estas multe pli interesitaj, scii, kiel li respondis al la moko kaj tranĉantaj vortoj kaj kiel li reagis al la rekliniĝo de fieraj kapoj aŭ al la ĝentile vualita esprimo de nesimpatiaj okuloj. Li sciis, ke li estas mokata kaj priiridata, ĉar li estas galileano, judo; sed nenie troviĝas mencio, ke li esprimis la fakton, ke li ne estas galileano, sed rekta ido de la Reĝo David. Li lasis kulpigi sin, ke li volas fari sin reĝo; kvankam tiu kulpigo trenis lin al kruela morto, li neniam apelaciis al Caesar aŭ klarigis, ke li vere ne bezonis la pompon de monarko. La nacieco de Jesuo eble faris lin pli akceptebla por Johano kaj Andreo kaj Petro kaj Nikodemo; ĝi certe faris lin freneza kaj ŝtono de la falo por Romo. Sed li persiste faris unu aferon pri siaj propraj sentoj... Li silentis.

Strange, ke la Granda Agitanto neniam elparolis siajn belegajn ideojn pri la raso en la sonoranta simpleco de sia Prediko sur la Monto; ankoraŭ pli strange, ke li neniam ekveturis al la okcidentmediteraneaj sklavomerkatoj, por forpeli per ŝnuregoj la homvendistojn... Li silentadis. Li jam estis elektinta la plej malaltan lokon por si mem — la plej malaltan naskiĝon, la plej sensignifan urbon en stranga gento, la malestimatan profesion de ĉarpentisto. Li esperis, ke aliaj vidos la noblecon de la malriĉeco. Li pensis, ke lia nova ordono de amo kaj frateco sub nia komuna Patro estas sufiĉa urĝo, por dispeli nian bagatelan diferencigon inter tiaj kaj tiaj homoj. Se liaj disĉiploj amus unu la alian, ili kredeble baldaŭ lernus, ke migdalaj okuloj aŭ nigra haŭto aŭ blanka haŭto faras same malmulte da diferenco kiel kurba nazo aŭ griza haro. Li kredis, ke estus pli bone por ĉiuj rasoj, veni al li kaj ĉirkaŭpreni kiel malgrandaj infanoj liajn ŝultrojn kaj fortajn brakojn, ol preni la teruran respondecon, kompare pesi animon kontraŭ animo. Jesuo Kristo, la afabla komprenema Filo de Mario, estis la paca liberiganto de ĉiu raso, kaj lia ĉarma simpleco devigis lin, fari sian Deklaron de la Egaleco en la plej klaraj kaj plej alvokaj vortoj: « Amu vian najbaron kiel vin mem! »

En la konfuzo de la raportoj kaj artikoloj pri Germanujo ni ne perdu la ĉefan aferon. Instinkte ni devus rigardi al Kristo, por ricevi la klarigon. Se la koro estas ĝuste agordita, la krio ne estas malproksima de Berlin al Bethlehem.

## La Gralo.

Pli ol 15.000 junaj batalantinoj jam grupiĝis sub la Graal-standardo.

Kiaj estas la celoj kaj metodoj de katolika ligo, kiu povas sukcesplene prezenti tiel admirindan demonstracion kiel la spektakloludon, kiu lastatempe okazis en la areno de Schiedam (Nederlando) kaj en kiu partoprenis 7,000 junulinoj el la Graal-societo?

La Gralo estas la respondo de nederlandaj junulinoj al la papa alvoko por Katolika Agado. Milope ili estas leviĝintaj, inspirite kiel la praepokaj kavaliroj de nobla vizio, ne plu la gardo de vualita kaliko, sed la renovigo de ĉio en Kristo, la starigo de Lia Regno.

La Gralo estas unu el la lastaj junecmovadoj. Antaŭ dekduo da jaroj la nova societo enkalkulis 15 membrinojn, nuntempe ĝi havas pli ol 15.000 en Nederlando mem, kie la movado naskiĝis. Filidomoj stariĝis en Berlin kaj lastatempe en London, kaj anglaj katolikaj junulinoj estas instruataj kiel gvidantinoj de movado, kiu ŝajnas esti destinita fariĝi tutmonda.

Por plene kompreni la eblecojn de tia movado, oni devas informiĝi pri ĝia funkciado kaj iom scii pri ĝia deveno.

La Virinoj de Nazareto estas ordena kongregacio por fraŭlinoj, kiuj klopodas imiti la virtojn de Mario, la perfekta patrino en sia kaŝita vilaĝa hejmo. Ili vivas jurpromesitan vivon en la mondo, la kongregacio estas fondita en novembro 1921 de Profesoro D-ro J. Van Ginneken, S. J., ĝia celo estas, gajni la mondon por Dio.

Iliaj unuaj klopodoj celis al konvertado de nekatolikoj en Nederlando kaj en la nederlandaj kolonioj, sed en la jaro 1926 pro urĝaj petoj de la episkopo de Haarlem Msgr. A. J. Callier, ili komencis okupiĝi pri katolikaj knabinoj, kiuj devas kontraŭstari novajn cirkonstancojn kaj novajn tentojn, sen sperto aŭ malnovaj tradicioj, por gvidi ilin. Situacio plena de malfacilaĵoj kaj postlanta senfinan takton kaj paciencon; tamen — kie oni povus trovi pli esperplenan rikoltejon ol inter ĉi tiuj junulinoj kun sia sentima kuraĝo, sia vigla vivo-forto kaj sia aventurema spirito?

Rezultiĝis la fondo de la Gralo (ni Esperantigas tiel la vorton Graal).

En la Gralo troviĝas du tute apartaj grupoj : 1. la Virinoj de Nazareto, kiuj estas la gvidantinoj de la movado, 2. la Gral-aninoj, kiuj simple estas junulinoj loĝantaj hejme, farantaj la ĉiutagan laboron en fabrikejo, oficejo ktp., sed kunvenantaj en la Gral-domoj dum siaj liberaj horoj, por akiri la Gral-spiriton.

La Gralo celas krei fortan « Por Dio »-movadon tiel potencon kiel la « Kontraŭ Dio »-movado, kiu hodiaŭ estas tiom minacanta danĝero. Tio estas la baza ideo de la Gralo, ĉiuj ĝiaj energioj tien celas. La propagandoj estas la Gral-domoj, ĉiu el ili estrata de du aŭ tri Virinoj de Nazareto kaj kun kelkcentoj da membroj. En la Gral-domoj ekzistas forta klubvivo, oni fondas kursojn, kuraĝigas la sportojn. La aktiveco de la diversaj domoj estas malsama laŭ la bezono, ĉar la movado enhavas junulinojn el ĉiuj klasoj kaj el ĉiu nivelo de klereco. En unu Gral-domo troviĝas nur universitataj studentinoj, alia « domo » troviĝas en la koro mem de la « ruĝa kvartalo » de Amsterdam. Nur la plej granda elasteco de la metodo povas ĝuste trakti la diversajn talentojn kaj certigi, ke ĉiu el la junulinoj evoluu siajn proprajn talentojn ĝisfunde kaj samtempe sian spiritan vivon. Unu celo neniam estas forgesata, kaj tio estas, ke la normala profesio de virino estas — edzineco. Ĉar la komunistoj deziras neniiĝi Dion kaj edzecon, efektive en Rusujo oni penegis forpreni de la patrinoj la infanojn, por eduki ĉiun infanon kiel komuniston, kaj la ununura baro, kiun la komunistoj ne povas venki, estas la kristana patrino, kiu amas Dion kaj amas sian infanon.

Ĉiu penego estas farata, por eduki la junulinojn kiel estontajn katolikajn patrinojn, kaj, por pli bone kuraĝigi ilin, la angla martirino, benita Margareto de Clitheroe, heroa edzino kaj patrino, estas elektita kiel unu el la patroninoj de la movado.

Kvankam ĝi estas amasa movado, la Gralo individue prizorgas siajn aninojn. Ĉiu povas ricevi konsilon pri elekto de profesio aŭ kariero, oficejo por laborperado kaj similaj praktikaj institucioj ekzistas.

La Gralo mem povas absorbi iun ajn kvanton da talentoj. Ĝi bezonas verkistinojn por siaj gazetoj, dramajn aŭtorinojn kaj muzikantinojn por siaj teatraĵoj, organizantinojn kaj sportestrinojn. La du hodiaŭaj allogoj dancado kaj ludado estas eduke uzataj. Per la spektakla ludo prezentita sur la areno de Schiedam de 7.000 junulinoj fine de aprilo, oni ricevis belan impreson pri tio, kion povas fari la Gralo rilate al ludado. Sed rilate al la dancado la eduka sukceso estas eĉ pli mirinda. Kutime ni nur pensas pri dancado rilate al la dancaloj, kaj ĝin apliki al sanktaĵoj, ŝokos kelkiujn inter ni; tamen la Gralo estas same prava kiel la Reĝo David. La Gralaninoj « dancas » la « Stabat Mater », kaj tiu danco iĝas la plej sankta, la plej respekta meditado. Ili « dancas » la « Rorate Coeli », kaj ŝajnas, kvazaŭ la ĉieloj devus malfermiĝi pro tia peto. En ĉi tiuj prezentaĵoj okazas neniam teatraj pozoj. Oni instruas la junulinojn, ke la himnoj ne devas esti ludataj kiel teatraro, sed devas esti klarigataj move : kaj por tion fari, la klarigantinoj devas unue ilin kompreni.

La parolita horajo de ĉi tiuj spektaklo-ludoj estas plej efika, kaj la amasa dirado de preĝoj aŭ de la Kredo aŭ de rezolucio estas eksterordinare impresa. Sed ĉi tiuj apartaj metodoj de la altiro de la popolo al Dio ne estas esencaj partoj de la Grala plano, ili nur estas iloj, kiuj en la momento estas helpaj.

Plua donaco, kiun la Gralo plejplene eluzas, estas la koloro. Ĝiaj domoj ne tiom flamas, kiel ili floras per ĝi. La malnovmodajn senkolorajn internojn ili jam ne ŝatas. La projekto de ornamaĵo devas esprimi la virinajn idealojn kaj entuziasmojn. La uniformoj de la membraro estas senĉesa ĝojo. Laŭrange la bluzoj estas oraj aŭ primolaj, verdaj, siringaj aŭ salmo-ruĝetaj. La jupoj verdaj aŭ violaj. La manteloj estas ruĝaj, verdaj, flavaj aŭ malvkoloraj. Tute senkonscie ili sin vestis laŭ la koloroj de la tulip- kaj hiacint-kampoj, kiuj ilin ĉirkaŭas. Tio ne mirigas, ĉar la movado estas inspirita de la energio kaj gajeco de juneco, printempo kaj ĉio, kio kreskas. Ĉi tiuj estas la fortoj, kiujn la Gralo kolektas en unuigitan « Por Dio »-movadon, en amasan militiron por gajni la

mondon por Kristo. Esti Gral-anino signifas, klopodi por altega idealo : flamiĝi la mondon per sindona amo al Dio.

Ja ekzistas unu kutimo de la Gralo, kiu bone ilustras la spiriton de la ligo: En la daŭro de ĉiu demonstracio, ĉiu spektaklo, ĉiu vojaĝo aŭ festo, ĉe ĉiu grava okazo — en la kapelo de ĉiu Graldomo sin trovas unu el la aninoj surgenue, preĝante kaj oferante sin, malgrandan oferaĵon, unuige kun la unu vera Oferajo, Jesuo en la tabernaklo.

« Sinjoro, mi fariĝu tio, por kio vi kreis min. Mi scias, ke vi atendas ion de mi, ke por mi kiel virino vi difinis apartan taskon. Vi permesas al mi, esti via apostolo. Helpu min kompreni, ke vi deziras, ke via brila figuro elbrilu en mi! »

Tia estas la preĝo de la Gralaninoj.

Albert E. HEPTON, Hull, Anglujo.

Por pluaj detaloj skribu Esperante al : « La Gralo », DEN HAAG, Oude Scheveningscheweg 90, Nederlando; BERLIN S W 61, Belle Alliance-Platz 4; LONDON SW 1, Sloane Street 58.

## La Katolika Junularo en Madagaskaro.

Inter la malgaŝoj, indiĝenoj de la granda afrika insulo Madagaskaro, ekzistas belaj katolikaj junularaj ligoj, kies plej grava estas la **Asocio de la Malgaŝa Katolika Junularo** kun 8.961 membroj en 418 grupoj kaj 31 distriktoj. 5.150 vivas en la apostola vikariejo (eparkio) Tananarivo, 3.811 en Fianarantsoa, 5.127 vizitadas regule la grupkunvenojn, kaj 4.559 fidele praktikas la monatan komuniojn malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj, kies ĉefaj estas la grandeco de la distriktoj, kaj ofte la grandega distanco ĝis la plej proksima misiisto. La granda plimulto de la loĝantaro estas idolana, multaj aliaj estas protestantaj aŭ mahometanaj, kaj el la intelektuloj multaj akceptis modernan eŭropan ateismon. Granda do estas la tasko de la asocio. Cetere depost 1919 ĝi estas aliĝinta kiel regiona unuigo al la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.).

La unuaj institucioj por la katolika junularo jam fondiĝis en la komenco de la katolika misio en Madagaskaro. Kiam en la jaro 1861 la unuaj pastroj eniris la insulon, unu el iliaj unuaj fondo estis la Kongregacio de Andohalo por la junuloj. Ĝi estis la bazo de la Katolika Unuigo, kies agado poste, dum la milito de 1883 kaj la ekzilo de la misiistoj, savis la katolikismon. Kiam normala situacio revenis, novaj unuigoj por junuloj kaj junulinoj fondiĝis. Sed sub la regado de la franca laikismo estis neeble, ilin kunligi. En la jaro 1913 Pastro Coudannes verkis statutojn por junulara asocio kun aprobo de la episkopo - - Guvernoro Picquié rifuzis la aprobon. Nur en 1915 lia posterulo Garbit, vidanta la maljustecon, kun kiu oni rifuzis al la katolikoj tion, kion oni permesis al la liberpensuloj kaj protestantoj, permesis la fondon de la Asocio de la Malgaŝa Katolika Junularo.

La bazo de la membreco estas tute libervola. La religiaj ĉefoj uzas nenian premon por aliĝi junulojn. Ili venas laŭ propra volo, kaj ĉiu klopodas varbi kamaradojn. Grupoj klopodas fondi novajn grupojn en najbaraj vilaĝoj. Oni postulas de la membroj monatan komuniojn, regulan viziton de la grupkunveno, kiuj ĝenerale estas dusemajnaj, laŭeble partoprenon je ĉiujaraj spiritaj ekzercoj kaj je kongreso, kiu okazas en la ĉefurbo Tananarivo.

La membroj estas fervoraj kaj eĉ heroaj en sia religia vivo. Oni scias unu kazon, en kiu 300 junuloj ĉeestis meson kun komuna sankta komunio. Inter ili estis tri grupoj, el kiuj unu faris antaŭtage piedmarŝon de 55 kilometroj, la dua de 65, la tria de 72 kilometroj en daŭra pluvo, por ne forresti de tiu religia kunveno! Ankaŭ la liturgia vivo estas bona, en multaj vilaĝoj oni trovas mesojn kun liturgiaj kantoj kantitaj de la tuta komunumo. Pastro Cardailiac skribas pri alia ekzemplo de religia sento : Meze en piedpilkludo la Angelus-sonorado

eksonis. Tuj la « senpartia » gvidanto manfrapis kaj ĉiuj ludantoj kune recitis la preĝojn.

Ankaŭ la intelekta klerigo estas grava. Komprenble ĝi devas adaptiĝi al la kultura nivelo en la diversaj lokoj. En la urboj ĝi estas multe supera al la vilaĝoj. Kie la junuloj estas en daŭra kontakto kun nekredantoj kaj protestantoj, ili devas esti bone preparitaj, kaj oni multe okupiĝas pri apologetikaj problemoj. Tio speciale estas grava en Tananarivo, kie la apostolado de la gazetaro estas signifa tasko de la katolika junularo. Por certigi fundamentan unuecon en la tuta asocio, la Centra Komitato publikigas ĉiujare programon de religia instruo, kiu indikas, kio en ĉiu kunveno devas esti studata laŭ bona manlibro. Se neniu estas kapabla fari paroladon pri la temo, la kunveno povas ĉiam konsisti el legado en la libro kaj sekvanta komuna diskutado.

(Finota.)

P. DE LA DEVÈZE.

## La Esperanto-Movado.

*Paco en la neŭtrala Esperanto-movado.* En majo kunveno okazis en Genève, por solvi la disputon estiĝintan per la fondiĝo de UFE kaj la rifuzo de UEA, retiriĝi favore al la nova organizo. Interkonsento estas atingita: UEA estas la oficiala internacia neŭtrala Esperanto-organizaĵo, en kiu la naciaj societoj kunlaboras kun certaj rajtoj kaj devoj. UEA oficiale reprezentas la movadon internacie kaj organizas la kongresojn. Ni gratulas! Se la sama decido estus farita duonjaron antaŭe, multe da malagrablaĵoj ne estus okazintaj. Tamen — pli bone malfrue ol neniam!

*La Esperanto-Kongreso en Köln* okazos, kiel la nova urbestro certigis, sen komplikaj. Ĝis komenco de julio aliĝis 750 kongresanoj. La intencita MOKA-kunveno kredeble ne povos okazi. Ĉiuj niaj gamikoj, kiuj partoprenos, skribu al la katolika Esperanto-grupo EKARO (Esperantista Kolping-anaro), Köln, Kolpinghaus, Breitestr. 108. En la Kolping-Domo ili trovos malmultekostajn loĝejojn kaj manĝojn kaj afablajn katolikajn amikojn.

*Kardinalo Van Roey akceptis katolikajn Esperantistojn.* La 3 junio Kardinalo Van Roey, ĉefepiskopo de Mechelen-Malines, Primato de Belgujo, akceptis delegitaron de katolikaj Esperantistoj, kiuj raportis al li pri la uzo de Esperanto por katolikaj celoj kaj transdonis al li librojn kaj dokumentojn. Tri personoj paroladis en flandra lingvo kaj franca lingvo, la kardinalo ĝentile respondis.

*Esperanto en anglaj lernejoj.* Okaze de la Brita Esperanto-Kongreso en Oxford okazis Instruista Kunveno, en kiu jenaj interesaj informoj estas donitaj: Esperanto nun estas instruata oficiale aŭ neoficiale en 27 lernejoj en Anglujo; pri Kimrujo, Skotlando kaj Irlando mankas informo. 14 estas popollernejoj (8 kun oficiala, 6 kun neoficiala instruo), 13 estas liceoj kaj similaj duagradaĵoj (5 kun oficiala, 8 kun neoficiala instruo). En la 27 lernejoj 1006 ĝelernantoj estas instruataj en Esperanto, 733 devige, 273 neoficiale (615 knaboj, 391 knabinoj).

*Esperanto en Germanujo.* La naciista revolucio ŝanĝis la situacion ankaŭ por la Esperanto-movado. Tuj ĉiuj radio-stacioj ĉesigis siajn Esperanto-programojn, kursojn, paroladojn kaj ĉe programoncojn. La *Germana Esperanto-Asocio* unue publikigis alvokon, deklarante plenan politikan neŭtralecon, sed poste petis la registaron, ĝin «samdirektigi» («gleichschalten»), t. e. submeti ĝin sub naci-socialistan komandon, prezentis al la registaro dokumentojn pri la uzo de Esperanto dum la mondmilito, proponis, fari eksterlandan propagandon por la naciista Germanujo per publikigo de broŝuroj aŭ informa gazeto kaj atentigis, ke la Esperanto-Kongreso en Köln estus bona okazo por tio. Ĝis nun oficiala deklaro de la registaro pri Esperanto ne estas farita, kvankam multaj gvidantaj naci-socialistoj vidas en ĝi «judan sennaciigilon». GEA rekomendas al siaj grupoj, aĉeti la Esperanto-eldonojn de la broŝuroj el la germana militpropagando. Ili estis interesaj por muzeoj kaj kolektoj; ke ili nun denove ricevas praktikan signifon, ni ne estus pensintaj. — *Germana Laborista Esperanto-Asocio* (kun ĉefe bolŝevista tendenco) kaj la centro de *IPE* (Internacio de Proletaj Esperantistoj) en Berlin estas tuj dissolvitaj de la police. — *SEA* (Socialista Esperanto-Asocio) decidis dissolvi, sed fondon de nova organizo «Ligo de Esperanto-Amikoj» sen politika tendenco. Montrigis, ke la

decido ne estis efektivebla. SEA do ankaŭ estas mortinta. — *Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj* (landligo de IKUE) malkovris simpatiojn por la naciismo. En sia cikulo de majo 1933 aperis dulingva artikolo pri «la senco de la nacia revolucio». Ĝi flatas kaj defendas la novan reĝimon kaj kritikas la antaŭan kondamnon de la naci-socialismo per la germanaj episkopoj per jenaj vortoj: «...por eldiri mian opinion pri la konfuzanta sintenado de la episkopoj... Mi jam dum la erao de Brüning opiniis mian tenigon malĝusta kaj erara; ankaŭ pastroj aprobis tiun opinion. La tute estis politika taktiko, kiu malsukcesis. En la politikon la Eklezio ne sin enmiksi. Eklezio, kiu jesas ĉiujn valorojn, de komenco devis jesi la valorojn sin montrantajn ĉi tie, kaj ne atendi, ĉu ili portanto povus superiĝi.» La Ligo perdis sian kasiston, kiu estas publika oficisto «staranta sur la bazo de la nacia registaro» kaj volas atendi la sintenon de la registaro al la Esperanto-movado.

*Interesa sukceso en Ĉeĥoslovakujo.* Okaze de la 10-jara datreveno de la fondo de la katolika Esperanto-movado en la Ĉeĥoslovaka Respubliko la ĵurnalo Lidové Listy (Popola ĵurnalo) dediĉis tutan paĝon al la movado sub la titolo «Per Esperanto en la tutan mondon!» La verkintoj de la artikoloj estas Pastro Font-Giralt el Hispanujo (Prezidanto de IKUE), Pastro Henry Joseph el Suda Hindujo, Pastro M. Caroli O. F. M. el Italujo kaj Pastro Andreo Cseh el Rumanujo. La ĵurnalo aperas en Praha kaj estas oficiala organo de la Katolika Popolpartio, kies ĉefa gvidanto estas Msgr. D-ro Jan Šrámek, ministro. Gvidanto por Bohemujo estas deputito kaj kanoniko P. Boh. Stašek, kiu ofte montris sian favoron por Esperanto. Lidové Listy ofte represas informojn kaj artikolojn pri Esperanto. Ĝi estas presata en nova moderna katolika presejo (Ĉeĥoslovaka aktiva tiskarna, Ĉeĥoslovaka Akcia Presejo) en Praha II., Karlovo nám. 6. Ni rekomendas ĝian viziton al Esperantistoj eksterlandaj. Esperanto parolata!

*La Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo* havis komence de julio sian unuan landan kunvenon en la kadro de la Katolika Junulara Kongreso kaj sub prezido de sia prezidanto Episkopo D-ro Eltschknier. Kiel reprezentanto de la Internacia Komitato de MOKA ĉestis nia aŭstra amiko Mudrak.

*Esperanto-Komitato de «Katholikentag» Wien*, dissendis prositan invitilon. La kongreso okazos 7-12 septembro 1933. Detalojn trovi en la maja numero de J. B. Petu la invitilon de S-ro L. Chiba, WIEN IV., Schaumburgergasse 5. Aŭstrujo!

*Bela gvidlibreto pri Bingen* apud la Rejno estas publikigita de la magistrato de tiu germana urbo. Estas precipe nuntempe nepre necese, ke en Germanujo administracio de konata urbo ekkonu, ke Esperanto estas utila kaj ĉie disvastigita. Ĉiu el niaj gelegantoj (escepte la germanoj) do bonvolu peti tuj la senpagan Esperanto-gvidlibron de la *Magistrato, Bingen am Rhein, Germanujo!*

*La hungara poŝto* eldonis oficialajn bildpoŝtkartojn kun Esperantoteksto. Do post Soveta Rusujo, Danzigo kaj Liechtenstein nun nova grava lando enkondukis tian praktikan uzon de Esperanto.

*Literatura konkurso por Esperantistoj el la tuta mondo.* La gazeto STAVOVSKA REFORMA en Praha I., Konviktska 5, Ĉeĥoslovakujo, aranĝas konkurson pri la temo: «Kian procedon estas necese elekti, por atingi la mondan harmonion en sferoj: nacia, internacia, ekonomia, politika kaj religia?» La verkoj estu skribataj en Esperanto, koncize, plenehave, en formo de planoj kaj projektoj, kiel akiri la plibonigon kaj kio ebligis la reorganizon de la socia stato per sekura evolua vojo. Lasta dato por ricevo: 1 septembro 1933. Premioj: 1. 500 kronoj, 2. 300 kronoj, 3. 200 kronoj. Skribu legeble sur unu flanko de la papero, laŭeble per maŝino. La laboroj enhavi proksimume 10 paĝojn kvartformatajn, ili estu ĉifritaj per devizo sur la verko kaj sur fermita koverto, kiu enhavas la nomon kaj adreson de la konkursanto.

*Esperanto en katolika lernejo.* Ni ricevis moderne aranĝitan, interesan, 58-paĝan jarraporton pri la katolika lerneja hejmo Bleyerheide (ĉe la germana-nederlanda landlimo). En ĝi troviĝas lerte verkita artikolo de nia amiko Frato Ansgarius Marzahn pri «Esperanto en la lerneja hejmo». Esperanto estas devige instruata en Bleyerheide. Serioze interesitaj personoj certe volonte ricevos ekzempleron de la grava dokumento, se ili skribas al Schulheim Bleyerheide, Post Kohlscheid bei Aachen, Germanujo.

*ISE* (Internacio de Socialistaj Esperantistoj) estas pentekoste fondita en Wien, aliĝis socialistaj Esperanto-asocioj en Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo kaj Hungarujo. La monata organo «La Socialisto» jam havas eldonnombron de 4.000. Do nun jam ekzistas 4 «Internacioj» de laboristaj Esperantistoj: SAT (supertendenca), IPE (komunista), ISE (socialista), TLES (anarkiista).



## Nia Movado.

### *Internacia Oficejo.*

*La novan adreson* bonvolu bone noti! La poŝtĉekaj kontoj kaj la adresoj por la poŝtĉekaj kontoj restas la samaj. La sekretarioj denove funkcias kaj esperas baldaŭ fini la respondadon de korespondadoj restintaj sen respondo pro la lasttempaj okazajoj.

*La internacia sekretario* devis ŝanĝi siajn vojaĝplanojn kaj ne venos en ĉi tiu jaro en orientajn landojn. Kredeble li veturos en venonta tempo al jenaj urboj kaj landoj: julio Reims (Francujo), aŭgusto Paris, Belgujo, Nederlando, septembro Genève, Svisujo, Wien (Aŭstrujo), oktobro eble Irlando kaj Anglujo.

*Afranko.* Geamikoj el Belgujo kaj Germanujo atentu, ke la afranko al Luksenburgoj estas la enlanda.

### *Aŭstrujo.*

*Esperanto-kunveno en la Generala Kongreso de Germanaj Katolikoj*, 7-13 septembro 1933. Jen la programo: 7 sept. salutvespero; 8 sept. pilgrimveturado per aŭtobuso al Lourdes-Groto en Maria-Gugging (en la Viena Arbaro); 9 sept. 9-a matene solena Esperanto-diservo, prediko en Esperanto de Prof. Hewera (Praha), benado de standardo, solena meso; 10 sept. (dimanĉo) partopreno en solena manifestacio en la kastelparko de Schönbrunn (solena Di-servo); 11 sept. matene festkunveno de la katolikaj Esperantistoj.

*Gr. Siegharts.* Fervore laboras s-anoj F. Novotny kaj F. Miksch, Esperanto-kursoj por junuloj kaj junulinoj. La 25 julio okazos en la katolika unuigdomo de Horn kunveno de la gesamideanoj kaj Esp.-gubernantoj de la ĉirkaŭa regiono.

*Salzburg-Parsch.* Bonege sukcesintaj Ĉe-kursoj de Pastro Prof. D-ro Christanell.

*Wien.* La 23 aprilo okazis ŝipekskurso de Vienaj Esperantistoj al Bratislava (Ĉeĥoslovakujo), nia nacia sekretario Mudrak kaj aliaj gemikoj havis je tiu okazo interparolon kun tieaj katolikaj geskoltoj. Dum pentekosto okazis ree vizito de Bratislavaj katolikaj gesamideanoj en Wien. — La 6 julio okazis kursfinesto de la Esperanto-Rondo de la Katolika Krueligo kun deklamoj, prelegoj, kantoj kaj varbado por LA JUNA BATALANTO.

### *Belgujo.*

*Katolikaj gazetoj* enhavis notojn pri MOKA.

### *Ĉeĥoslovakujo.*

*Nia Poŝtĉeka konto.* La slovakaj katolikaj skoltoj bonvolis disponigi sian poŝtĉekan konton al MOKA kaj LA JUNA BATALANTO. Mensendoj el Ĉeĥoslovakujo do iru estonte al konto 15132, Ustredie slovenskych katolíckych skautov pre Slovensko, Bratislava.

*En Praha* okazis la unua landa kunveno de ĉeĥoslovakaj katolikaj Esperantistoj. Kiel MOKA-reprezentanto partoprenis Walter Mudrak (Wien).

### *Francujo.*

*La nucia sekretario* de MOKA iom propagandis en la Franca Esperanto-Kongreso en Orléans. La franclingva MOKA-bulteno kun interesa enhavo daŭre aperas, nun 4-paĝa.

*Kelkaj gazetoj*, i. a. la organoj de J. E. C. (Katolika Studenta Junularo) promesis publikigi notojn pri la korespondservo de MOKA. La Informservo de SIPUC (Internacia Sekretariejo de la Katolika Universitata Junularo) en sia numero 2-3 ankaŭ analizas nian J. B., kiu estas citata kiel « revuo simpatianta », « L'Égide », gazeto de katolikaj studentinoj en Rennes, enhavis noton.

### *Svisujo.*

*Zürich.* Nia amiko F. Sprich faris varbparoladon pri Esperanto kaj MOKA.

---

## Kie oni parolas pri ni.

*Kardinalo Innitzer*, ĉefepiskopo de Wien, faris diversajn rimarkindajn paroladojn pri la paco. En la maja numero de J. B. nia kunlaboranto Mudrak raportis pri unu el ili. Intertempe ni vidis la plenan tekston de la parolado de Lia Kardinala Moŝto. Ni ĝojegas, ke inter la rekomendindaj pacaj organizaĵoj nome cititaj de Kardinalo Innitzer troviĝas ankaŭ nia MOKA. Respektoplenan dankon!

*La Enciklopedio por Teologio kaj Eklezio* (Lexikon für Theologie und Kirche), la grava 10-voluma verko aperanta en la eldonejo Herder, en sia kvara volumo parolas i. a. pri la katolika pacmovado. MOKA estas citata. Verkinto de la artikolo estas P. C. Noppel. S. J., direktoro de la Collegium Germanicum-Hungaricum en Romo. Ni jam sciigis, ke ankaŭ en la artikoleto pri Esperanto MOKA kaj LA JUNA BATALANTO estas nomitaj.

*Der Grosse Herder*, 12-voluma ĝenerala enciklopedio aperanta en la sama eldonejo, en sia 4-a volumo citas la MOKA-movadon inter la katolikaj pacligoj.